

SUDFRANCIA ★ STELO

N°151 - 4a kvaronjaro 1999 - 4° trimestre 1999 - 10 F

Dulingva bulteno eldonita de la E°- Federacio de Langvedoko-Rusiljono
 Bulletin bilingue édité par la Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon
 Jarabono / Abonnement : 35F al pĉk / au CCP 956-28 P Montpellier



KALENDARO POR LA JARO 2000

	JANUARO	FEBRUARO	MARTO
LUNDO	3 10 17 24 31	7 14 21 28	6 12 19 26
MARDO	4 11 18 25	1 8 15 22 29	7 13 20 27
MERKREDO	5 12 19 26	2 9 16 23	1 7 14 21 28
ĴAŬDO	6 13 20 27	3 10 17 24	2 8 15 22 29
VENDREDO	7 14 21 28	4 11 18 25	3 9 16 23 30
SABATO	1 8 15 22 29	5 12 19 26	4 10 17 24
DIMANĈO	2 9 16 23 30	6 13 20 27	5 11 18 25
	APRILIO	MAJO	JUNIO
LUNDO	3 10 17 24	1) 8 15 22 29	5) 12 19 26
MARDO	4 11 18 25	2) 9 16 23 30	6) 13 20 27
MERKREDO	5 12 19 26	3) 10 17 24 31	7) 14 21 28
ĴAŬDO	6 13 20 27	4) 11 18 25	1) 8 15 22 29
VENDREDO	7 14 21 28	5) 12 19 26	2) 9 16 23 30
SABATO	1 8 15 22 29	6) 13 20 27	3) 10 17 24
DIMANĈO	2 9 16 23 30	7) 14 21 28	4) 11 18 25 6/7

JAM NOTU VIAJN RENDEVUOJN KUN ESPERANTO EN 2000 !

**VOYAGER, SE RENCONTRER,
 COMMUNIQUER DANS LE MONDE
 ENTIER : UN REVE ? NON !**

Avec l'ESPERANTO, c'est possible :
 il suffit de l'apprendre !

Renseignez-vous à la fédération d'ESPERANTO
 du Languedoc-Roussillon :

04.67.75.62.98 - 04.66.32.86.36 - 04.68.34.22.18


<http://www.esperanto.org/jefo>




ESPERANTO

LANGUE INTERNATIONALE

SCHEFF



Kolora anonco aperinta la 7an de decembro
 sur la unua paĝo de la suplemento "Ressources"
 de "Midi Libre" kaj vidita (legita?) de kelkaj
 miloj da legantoj.



ANTAUPAROLO

Ne mankis malĝojigaj eventoj en la lastaj semajnoj : inundoj, polucio, ŝtormoj, konfliktoj... Iuj novaĵoj, ekzemple la pozitiva anonco, ke la eŭropa unio pligrandiĝos ĝis Azio (Turkio), kuntrenos evidentajn problemojn, espereble solvotajn iom post iom. Fine, aliaj eventoj kiel la kunveno de Seattle, povas indiki, ke finiĝis la regado de iuj, senkonsidere de aliaj . Ni vidos poste !

Sojle de nova simbola jaro -ni devos iom pacienci ĝis nova jarcento kaj nova jarmilo - **ni povas esperi je pli bona estonteco por ĉiuj** .

La nova poŝtmarko ĉi-supre, desegnita de dekjara lernantino el Lozère, simbolas tiun revon de paca kunvivado inter diversetnaj homoj . Ĉu toleremo, reciproka respekto en grupinterrilatoj, kie neniu provos trudi sian ekonomion, sian kulturon (pere de la lingvo) iam eblos ?

Finiĝas jarcento, kiam alternis aŭ kundisvolviĝis teruraĵoj kaj progresoj . Ni pretigu kaj pretiĝu por baldaŭa tria jarmilo . Al la homaro ni daŭre proponu neŭtralan kaj simplan komunikilon. Se la mondo vere fariĝis vilaĝo, la tieaj vilaĝanoj sukcese **komuniku por akordiĝi** !

Jean Hénin

SUDFRANCIA STELO

Ĉiu nova jaro ankaŭ signifas pagon de kotizoj, abonoj, ktp . Bonvolu ankaŭ en la venontaj semajnoj (aŭ tuj) pagi vian reabonon al la bulteno de Langvedoko-Rusiljono. La tarifo restas la sama (por la lasta fojo !). Se vi ne estas membro de grupo, sendu vian ĉekon de 35 F je la nomo de "Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon" (se estas poŝtĉeko : 956-28 P Montpellier) al nia kasistino : Lucette Négron -40 Chemin des Amandiers -34400 Lunel . Se vi estas membro de grupo, pagu rekte al via kasist(in)o. Anticipan dankon ! Kaj se subite frapas vin nekomprenemo de esperanto, kiam temas pri kotizoj kaj abonoj, la rekomendo francalingve estas :

Merci de bien vouloir renouveler votre abonnement à SFS (Sudfrancia Stelo) en suivant les consignes soulignées ci-dessus, si vous êtes espérantiste isolé(e). Si vous appartenez à un groupe, voyez avec le trésorier du groupe .

Kaj se vi havas rimarkojn pri la enhavo de la bulteno, se vi volas sendi kontribuojn (kial ne ?), ne hezitu rilati kun la redaktoro, kies adreso estas sur la lasta paĝo . Denove anticipan dankon !

Ni memorigas, ke laŭ indikoj de la grupestroj, ni volonte kaj senpage sendos SFS dum unu jaro al novaj gelernantoj . Ili decidos poste, ĉu ili deziras pluricevi SFS pagonte .

FINANCOJ (viaj financoj !)

Ni gratulas vin, ke vi interesiĝas pri esperanto, ke vi legas "Sudfrancia Stelo" (unua ŝtupo), kaj ke vi ĉiam pagas vian abonon ĝustatempe sen realvoko de la bulteno (dua ŝtupo) . Esperanto progresos pli bone, se en via urbo kuniĝos la diversaj esperantistoj kaj se vi-mem kontribuos al la vivo de la loka grupo (tria ŝtupo) .

Komprenoble oni povas salti rekte ĝis la tria ŝtupo, evitante la du unuajn, ktp.

Se restas iom da mono en via monujo aŭ sur via bankkonto (se ne en januaro, eble en oktobro), kial ne aboni kaj legi E°-gazetojn aŭ revuojn ? (kvara ŝtupo) Ekzistas multaj eblecoj (vidu ĉi-poste kelkajn tarifojn), ekzemple "Kontakto" por simpla lingvaĵo, "Monato" por artikoloj pri ĉiuj aktualaj temoj, "El popola Ĉinio" por bela kolora revuo, ktp . En gazetoj kiel "Eventoj" aŭ "Heroldo" vi trovos multajn adresojn por kontakti esperantistojn aŭ partopreni renkontojn francie aŭ eksterlande kaj tiel praktiki la lingvon (kvina ŝtupo).

Kaj se esperanto estas ankaŭ por vi idealo, se vi konsentas, ke organizitaj ni estas pli efikaj ol apartaj , aliĝu al E°-asocioj , naciaj, internaciaj, transnaciaj (sesa ŝtupo) . Espéranto-France (aŭ UFE) : 4bis, Rue de la Cerisaie 75004 Paris estas la franca sekcio de UEA (Universala Esperanto Asocio) . Sat-Amikaro estas la sekcio de francparolantoj de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), ambaŭ 67, Avenue Gambetta 75020 Paris.

Pliajn informojn, tarifojn, aliĝilojn, ktp vi povas peti de ni. Ĉiukaze ne restu supraĵe nek teretaĝe, supreniru kelkajn ŝtupojn !

FINANCOJ (de la federacio)

La komitato, kiu organizis la Universalan Kongreson (UK) de UEA en Montpellier en 98, ricevis parton de la fina profito. Laŭ decido de la komitatanoj, la ricevita sumo estis disdividita inter pluraj E°-asocioj, inter kiuj nia federacio. Ni kore dankas al la komitato pro tiu atribuo . Ĉiuj sugestoj estos bonvenaj por la uzo de tiu mono : stipendioj al gejunuloj, aĉeto de materialo , realigo de dokumentoj, helpo al projektoj ... Sendu viajn proponojn al SFS antaŭ la printempa kongreso en Ganges la 9an de aprilo .

PERKORESPONDA KURSO

Por koleĝianoj kaj liceanoj validas ekde nun nova sistemo . Por la sendo de ĉiu leciono, sufiĉos poŝtmarko je 3,50 F anstataŭ du aŭ tri trifrankaj poŝtmarkoj . La kurso funkcias por gejunuloj kaj plenkreskuloj . Se vi konas iun, kiu interesiĝas pri esperanto kaj pretas provi kelkajn lecionojn (antaŭ ol findecidi), ne hezitu direkti lin/ŝin al la respondeculo Claude Cayzac, 800 chemin de Bellevue, 34820 Assas (telefono 04 67 59 55 74), kiu estas nun atingebla ankaŭ sur la reto : <claude.cayzac@wanadoo.fr>

Peradas por vi **Esperanto-France**
 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS
 Telefono : 01 42 78 68 86
 Telekopiilo : 01 42 78 08 47
Abonoj validas por la kalendaro jaro
Abonigi geamikojn el nepagipovaj
landoj eblas pere de Esperanto-France.

Montpellier sur la reto en E° ?

Laŭ la ĉi-posta teksto aperinta en
 "La gazette de Montpellier",
 informoj pri la urbo estos baldaŭ
 disponeblaj en pluraj lingvoj, inter
 kiuj esperanto. Kiu jam konstatis ?

INTERNET EN OC

Le site internet de la ville
 de Montpellier parlera
 bientôt occitan.
 Les informations de ce site
 (programmes culturels,
 délibérations du conseil
 municipal) sont toujours
 disponibles en français et
 le seront bientôt aussi en
espéranto, en anglais et
 en allemand. ●

ABONOJ POR 2000

Brita Esperantisto	6 numeroj	200
Dia Regno	6 numeroj	80
El Popola Ĉinio	12 numeroj	192
Esperanto (por nemembroabonantoj UEA)	11 numeroj	200
Eventoj (pri la Esperanto-movado)	24 numeroj	230
Evento	aerpoŝte	270
Eventoj ret-info	12monata periodo	140
Fonto (literatura revuo)	12 numeroj	180
Franca Esperantisto	11 numeroj	200
(por ne aktivaj membroj de UFE)		
Franca Katolika Esperantisto	4 numeroj	60
Heroldo de Esperanto (pri E. movado)	16 numeroj	185
Juna Amiko	4 numeroj	unu ekzemplero
(interlerneja revuo)	de 2 ĝis 9 samadrese	po 50
	ekde 10 samadrese	po 40
Komencanto (internacia, el Rusio)	8 numeroj	92
Kontakto (por ne TEJO-membroj)	6 numeroj	120
La Domo	4 numeroj	unuopuloj
(Revuo de profesioj kaj servoj)	entreprenej	200
	studentoj	80
La Kancerkliniko (politika, kultura, ajnista)	5 numeroj	130
La Ondo de Esperanto (Ruslando)	12 numeroj	145
	aerpoŝte	12 numeroj
Literatura Foiro	6 numeroj	172
Literaturaj numeroj de Franca Esperantisto	3 numeroj	105
Litova Stelo	6 numeroj	75
Monato (Internacia magazino)	12 numeroj	256
Monato (aerpoŝte)	12 numeroj	290
La Jaro – poŝkalendaro de Monato		33
Rok' Gazet' (pri muziko)	1 numero/jare	
Abono por	3 numeroj	105
Verda Lupeo/Fenikso (filatelo)	3 numeroj	100

SFS respondecas sed ne kulpas !

Kelkaj rendevuoj menciitaj en la lasta SFS ne plu validis kelkajn tagojn post la apero. Ni ne kulpas pri la novaj decidoj de iuj organizantoj ! Tiel estis pri la kongreso de UFE, kiu finfine ne povos okazi en Bretonio sed male disvolviĝos en Boulouris (Var) je alia dato (1a ĝis 4a de junio, je Ĉieliro) sub nova nomo "aktivula semajnfino". La staĝo de Batipaume, planita samdate (30 V-7 VI), ne estas modifita, ĉar la salonoj/ĉambroj estis rezervitaj, kaj ne estus facile akordiĝi pri novaj datoj.

La "konferenco pri esperantologio", kiun ni anoncis fine de oktobro en Sète, post interŝanĝo de leteroj kun la organizintino, fakte ne okazis... ĉar iuj prelegontoj ne plu povis veni. Teorie ĝi devus tamen okazi "iam dum printempo". Espereble estos iom da konsidero pri la jam planitaj rendevuoj por eviti novan kolizion. Pro tio kaj pro la datoj de la paskaj ferioj, ni elektis dimanĉon la 9an de aprilo por nia federacia kongreso en Quissac. Ni aperigos en la venonta bulteno ĉiujn aranĝojn okazontajn en nia regiono inter aprilo kaj junio, se oni bonvolos informi nin ĝustatempe.

Foje ni ĉerpas el aliaj informiloj, ekzemple el "Okazas", informojn pri la vivo de la grupoj. Bone, se via agado estas konata naciskale sed ne forgesu sendi samtempe al SFS kopion de viaj informoj. Ni ne povas garantii, ke aperos en SFS informoj senditaj al aliaj gazetoj !

Esperanto-Info, "le bulletin d'information sur la langue internationale", en la franca lingvo pri la internacia lingvo, redaktita kaj eldonita en Nice, verŝajne malaperos post 24 numeroj kaj 6 jaroj, krom se anoncis sin lastatempe iu por anstataŭi la redaktoron.

Monda Turismo (en Bydgoszcz - Pollando) eldonis sian turisman kalendaron por 2000. "Monda Turismo" estas "asocio por faciligo de la internacia turismo per aplikado de esperanto" kaj tiel faciligas partoprenon al E°-aranĝoj en tre diversaj landoj, per nemultekostaj bus- aŭ flugkaravanoj. Eĉ eblas en oktobro aŭ novembro £000 flugvojaĝi ĉirkaŭ la mondo. Detaloj kaj adresoj haveblas de SFS.

VIVO DE LA GRUPOJ

BEZIERS

La venontaj kunvenoj okazos **sabate je 14h30 en Domo de Asocioj** (domo hejtita) : la **8an de januaro** (ĝenerala kunveno), **12an de februaro**, **11an de marto** kaj **8an de aprilo**.

Ni memorigas al vi, ke ni ne sendas individuan kunvokilon . Se vi forgesos la ĉisuprajn datojn, tamen sciu, ke niaj kunvenoj okazas ĉiun duan sabaton de la monato -maloftaj esceptoj, kiam tiu dato kolizias kun festoj (Pasko, ktp) . La laboro estas multe pli profitdona, la decidoj pli valoraj, kiam ni troviĝas multaj . Do notu bone la datojn deciditajn jam en lasta junio kaj rezervu tiujn datojn por esperanto.

Kiel vi jam scias, **la staĝo en Agde okazos de la 30a de majo ĝis la 6a de junio** . Ĝi finiĝos plurajn tagojn antaŭ Pentekosto, do vi povos facile ĝin partopreni . Se vi deziras kompletajn informojn kaj aliĝilon, skribu aŭ telefonu al ni : adreso kaj telefonnumero en alia parto de tiu bulteno . Serĉu ilin !

La 4an de decembro la kutima Zamenhofa tago venigis tridekon da personoj . Partoprenis ankaŭ gesamideanoj el apudaj departementoj kaj urboj : Montpellier, Perpignan, Lozère . Abunda kaj bongusta saŭrkraŭto satigis ĉiujn . Posttagmeze estis prezentitaj vidbendoj pri la UK de Montpellier kaj Israelo, kie disvolviĝos la UK en 2000 . Dankojn al la organizintoj, helpintoj kaj partoprenintoj .

MONTPELLIER

Novaĵoj pri la Montpelliera esperantoklubo :

Kunveno de la 7a de oktobro : ĉeestis 8 homoj . Pere de la filino de Ge-Capus ni havis novaĵojn pri malnova anino : Sinjorino Dennebecq . Sinjoro Capus parolis ankaŭ pri la langvedok-rusiljona esperanto-federacio, kies kunveno okazis en Béziers, kelkajn tagojn antaŭe . Yvette Vierre raportis pri la financa bilanco de la 83a Universala Kongreso en Montpellier .

Kunveno de novembro : ĝi ne okazis pro fermo de nia kunvenejo, la domo "L'Escoutaire" .

Kunveno de la 2a de decembro : Yvette Vierre parolis pri jara protokolo inter la domo l'Escoutaire kaj nia asocio . Ni daŭrigas la kontrakton . Ni ŝanĝis kelkajn detalojn pri la ĉiujara anonceto pri niaj kunvenoj, aperanta en la Jarlibro de UEA . Ni pagis al UEA plurjaran debeton pri tiu anonceto .

Annick Tora anoncis sian demision de la kasistoposteno de nia asocio . Ni dankis ŝin kaj kompreneble serĉas iun homon interesatan .

Yvette Vierre legis leteron de la prezidantino de LKK en Montpellier . Tiu letero akompanis ĉekon respondantan al sumo atribuita de LKK . La ĉeestintoj komisiis la lokan sekretarion perletere danki la LKK-on .

La venonta kunveno estos la **Ĝenerala Kunveno** de nia asocio . Ĝi okazos **ĵaŭdon la 6an de januaro 2000** je la 18a horo en l'Escoutaire kun jena tagordo : agadraporto, financa raporto, kandidatiĝoj al nova estraro; diversajtoj .

Raportis la loka sekretario Louis Ensuque

Esperanto PTT Hérault :

Sekve de informkunveno organizita de Thierry Saladin lastan jaron, ĉiusemajna esperantokurso funkcias ekde la fino de novembro 1999, kaj okazas ĉiun ĵaŭdon je la 17h30 en la konstruaĵo, kie kuŝas regionaj administracioj de France Télécom . Seson da gelemantoj instruas bonvolemlino Jeannine Bony .

Notindas, ke asocio "Esperanto PTT Hérault" kreiĝis ĉi-jare ene de Esperanto PTT, kaj provas diskonigi kaj lernigi la Internacian Lingvon ene de PTT-medio, precipe en Montpellier, Béziers kaj ĉirkaŭaĵoj .

NDLR : ni salutas la naskiĝon de nova asocio poresperanta kaj de nova kurso . Gratulojn kaj bonan sukceson al la prizorgantoj !

Réinsertion et Espéranto :

La ĝenerala kunveno de la asocio okazis la 30an de oktobro . Intensa kurso komenciĝis por la novaj varbitoj . Daŭre Thierry Saladin vizitis kolegiojn kaj liceojn de pluraj departementoj, de A kiel Aveyron ĝis V kiel Vaŭkluzo .

PERPIGNAN

⊙ **Radio-France Roussillon** . Perpignan (66) : Le président du C.C. Espéranto local René Llech Walter a été interviewé le 20 octobre sur cette Radio après un entretien en catalan sur "Radio Arrels" . (*Inf. J.Amouroux*)

□ **Une médaille et un prix**

Perpignan (66) : Charles Gérard-Voinçon, secrétaire du Centre Culturel Espérantiste vient de recevoir la médaille de la Société d'Encouragement .

Le Groupe Poétique culturel et artistique du Roussillon a remis le 1er prix de poésie libérée ou de prose poétique à Fernande Terral, une des chevilles ouvrières du Cercle Biterrois d'Espéranto . (*Inf. J.Amouroux*)

Gratulojn al la gesamideanoj cititaj ĉi-supre (anoncetoj de "Okazas"). Gratulojn ankaŭ al la informinto Jean Amoureux dank'al kiu aperis la du partoj de "Vagante tra la francaj Esperanto-poŝtkartoj". Ĉiu unuopa numero, bele ilustrita, estas mendebla al UFE (35F). Ĉiam estas disponeblaj ĉe la kultura centro, kiel indikite en la lasta SFS, vidbendo (koncerto de Handzlik + UK de Montpellier) kaj la turisma libreto pri Perpignan. Kadre de "Réinsertion et E°", Thierry Saladin prelegos dufoje en Perpignan (auditorium de l'hôpital, Avenue Joffre, je la 20h30) laŭ la temoj prezentitaj aliloke: "Eŭropo, jes, sed kun kiu lingvo?" -la 1an de januaro- kaj "Esperanto, vivanta lingvo kun idealo" -la 18an de januaro.

Jarfina ekspozicio: La asocio "Astem Be" ekspoziciis pentraĵojn en la festsalono de Pollestres okaze de la jarfinaj festoj. Inter la ekspoziciintaj artistoj, niaj gesamideanoj Alice Payret, Renato Figueira, Iaroslav Matviichine. "L'Indépendant" menciis, ke 3 partoprenantoj parolas en la "monda lingvo, esperanto".

LOZERE

En "Lozère Nouvelle" regule aperas leteroj de legantoj pri la lingvo-problemo. Jen du el ili, favoraj al esperanto. Francis Bernard ankaŭ aperigis anoncetojn pri esperanto.

Lastminute: (3a de januaro)
Longa artikolo en "Midi Libre"
pri interŝanĝo kun Ĉinio pere
de esperanto.

Où en est le français?

(LN - 26 x 1)

De Francis Bernard demeurant à Mas-Saint-Chély :

ordinaire machine d'invasion intellectuelle que constituent désormais les États-Unis ».

J'aimerais compléter la très intéressante lettre de Noël Aujoulat parue dans "La Lozère Nouvelle" du 12 novembre. Il me semble qu'il ne suffit pas de constater la perte de la langue française. Ni d'en accuser les enseignants (du privé comme du public) qui font tout leur possible, sans démeriter par rapport aux anciens.

D'ailleurs, on trouve toujours une minorité de brillants élèves. Je pense qu'il faut chercher les raisons de la défection du français et essayer de trouver des solutions pour y remédier.

Dans le cas des paquebots français, leur privatisation n'oblige plus à prendre des marins français.

Il faut étudier le milieu dans lequel vivent la plupart des jeunes. Dès l'enfance, ils "baignent" dans une ambiance anglo-américaine : la radio, la télévision, les publicités (parfois entièrement en anglais), les habitués à considérer naturel l'usage de bon nombre de mots anglais. Les rues de toutes nos villes sont truffées d'enseignes et de publicité en anglais, sans compter les inscriptions sur les vêtements des passants transformant ceux-ci en autant d'homme-sandwich... bénévoles !...

Que penser d'un cinéaste français réalisant un film en anglais (Jeanne d'Arc) et d'un ministre de l'Éducation déclarant : « L'anglais n'est plus une langue étrangère » ? Il a reconnu ces jours-ci à l'Assemblée Nationale : « Cette extra-

Que peut l'école face au rouleau compresseur de la société de consommation à l'américaine ?

Je pense qu'il est grand temps que les Français se réveillent pour empêcher la mise en place d'une langue hégémonique en Europe. Il y a encore quelques Français pour penser que le français ex-langue diplomatique serait la langue hégémonique. Pensée naïve et irréaliste face aux six milliards de terriens et à leurs milliers de langues !

De même, il est irréaliste de dire que la langue commerciale et financière actuelle, dégénérée de l'anglais, est la langue internationale.

C'est pour l'instant un piètre moyen de communication avec toutes les erreurs de compréhension que cela comporte tout en privilégiant une très petite minorité d'anglophones de très bon niveau qui s'accaparent les places de direction dans le monde du commerce et de la finance. Il n'y a, à mes yeux, (et nous sommes de plus en plus nombreux à le penser) qu'une solution pour protéger les langues maternelles : l'usage international d'une langue neutre, facile à apprendre par l'absence d'exceptions et par sa construction, reconnue par l'ONU et l'UNESCO et qui placerait tout le monde à égalité linguistique. Mais de même qu'il a fallu longtemps pour convaincre internationalement de l'usage des chiffres arabes, il faudra attendre, tout en prouvant le bien-fondé de l'esperanto.

La langue internationale

Une abonnée de Saint-Flour, fait l'apologie de l'esperanto :

Je réponds à la lettre de M. Aujoulat de Cugnaux, qui nous décrit son voyage formidable en Grèce, mais un peu déçu par le problème de la langue, pour se faire comprendre ou comprendre c'est dur, et je suis tout à fait d'accord avec lui.

Mon point de vue, serait que tout le monde puisse s'exprimer avec la même langue, par exemple l'esperanto, langue internationale, neutre, qui est nécessaire du fait du développement sans précédent des relations et des échanges en Europe et dans le monde entier.

Cette langue est très facile, tout le monde peut l'apprendre en quelques semaines. Dans les écoles, les enfants auraient leurs études simplifiées. Leur français serait de meilleure qualité, car comme le dit M. Aujoulat, 20 % des élèves de 6^e ne savent pas lire, les copies du bac sont indéchiffrables, etc.

Ils auraient plus de temps à se consacrer au français.

Ils n'auraient que deux langues à apprendre, français et esperanto et tous les pays du monde seraient comme nous leur langue natale et l'esperanto, ce serait formidable !". ■

Pro pluraj kialoj, la printempa kongreso anoncita en Ganges finfine ne okazos tie sed en Quissac, dimanĉon la 9an de Aprilo, ekde la 10a horo. Pro tiu relative frua dato espereble ne estos kolizioj kun aliaj eventoj en majo (dum la printempaj lernejaĵoj, kiuj etendiĝos en nia regiono de la 15a de aprilo ĝis la 2a de majo, disvolviĝos la Sat-Amikara kongreso en Fouquières-lez-Lens -de la 22a ĝis la 25a de aprilo kaj la Eŭrop-Unia kongreso en Oostende -de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo). Estas antaŭvidita ekspozicio pri E° en Quissac sabaton la 8an de aprilo posttagmeze. Pri la distra programo de dimanĉo posttagmeze, ĉiuj ideoj estas bonvenaj. La venonta "Sudfrancia Stelo" aperos kompreneble antaŭ la printempa kongreso (fine de marto ?) kun la lastminutaj informoj

QUISSAC (30)

Dank'al la agemo de juna Mikaelo Simon kaj de la loka "Relais familles" okazis Esperanto-tago en Quissac la 2an de novembro. Partoprenis deko da esperantistoj. Vizitis kelkaj interesataj personoj. Ekspozicieto, vidbendoj, provleciono, retedemonstro. Konklude deko da personoj pretas komenci kurson en januaro. Gratulojn kaj bonan sukceson! Artikoloj aperis en "Midi Libre" por anonci kaj raportoj pri la evento. Jen parto de la raporto.

Les échos du village

■ **Journée découverte Esperanto.** - Le mardi 2 novembre aura lieu au Relais familles, 21 rue du Pont à Quissac, une journée d'information sur la langue internationale qu'est l'Esperanto.

Cette journée a pour but, de mieux faire connaître ce langage à la population du canton de Quissac.

Par l'intermédiaire de membres d'associations espérantistes dans la région, de vidéos, de documentations, les visiteurs pourront avoir des informations sur l'Esperanto, visiter des sites Internet à ce sujet et suivre leur premier cours d'Esperanto à 14 h.

Le Relais Familles, antenne de la Fédération départementale des familles rurales du Gard, répond aux attentes de la population.

C'est à l'initiative de plusieurs jeunes du village, qu'est venue l'idée de cette animation, dans le but de créer une association Esperanto à Quissac.

Afin de soutenir et d'accompagner ces jeunes dans leur projet, le Relais propose donc cette journée.

Pour tous renseignements complémentaires, tél. 04 66 77 08 61.

■ Le 2 novembre, le Relais familles de Quissac, antenne de la Fédération départementale des Familles rurales du Gard, a organisé une journée d'information sur cette langue universelle, neutre et facile à apprendre qu'est l'espéranto.

A l'initiative et sur proposition de jeunes Quissacois souhaitant créer une association espérantiste sur le canton, le Relais a donc mis en place cette animation qui a remporté un vif succès auprès de la population.

A l'heure d'Espéranto

En présence d'espérantistes d'associations régionales, de la chargée d'espéranto au sein de la Maison de l'Europe, la journée a été partagée entre la diffusion de vidéos d'information, la visite de plusieurs sites Internet consacrés à cette langue, la distribution de documentations, et d'une initiation linguistique.

Le but de cette journée était, d'une part de mieux faire connaître l'espéranto, et d'autre part de soutenir et accompagner ce groupe de jeunes très motivés dans leur projet de création d'association, Michaël Simon, Julien Baticle, Juliet Vilain.

Si vous êtes intéressés pour les rejoindre ou pour en savoir plus, prenez contact avec le Relais familles de Quissac, 21, rue du Pont 30260 Quissac, 04 66 77 08 61.

MANRESA (KATALUNIO)

29A KATALUNA KAJ DUA TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

Aliĝis ĉirkaŭ 130 homoj, inter kiuj pluraj el nia federacio kaj de Sud-Pireneoj. Amika etoso kaj varia programo, kiel kutime. Ni ne partoprenis la oficialan akcepton de la urbestro, jen tamen kelkaj frazoj de li el la kongreslibro: "Ni revas pri tio, ke iun tagon malaperu la nekompreniĝado kaj la militoj. Sed, unue, ni bezonas havi je nia dispono iun lingvan komunikilon vere facilan kaj samgrade akcepteblan en la tuta planedo. Tute ne facile estas atingi pri tio ĝeneralan konsenton, precipe kiam la intereso disvastiĝas kun neleĝaj aspiroj de kultura altrudado. Laŭ tiu senco, la plej evidentaj kaj kreskantaj lingvaj problemoj en la institucioj de la Eŭropa Unio, pravas al ni ke, havi universalan lingvon je nia dispono, kaj ankaŭ ke tio apartenu al Ĉu kaj al neni, daŭre estas nobla kaj atentinda idealo".

Inter la menciindaj programeroj: interesaj prelegoj de nederlanda fakulo Bert de Wit pri klimatsanĝigo kaj biologia diverseco, de Emilo Mas pri la fontenergioj de morgaŭ kaj la problemo de akvo, ankaŭ de aŭstralia verkisto Trevor Steele pri literaturo. Ni ĝojis revidi Bruno Robineau, kiu prezentis sian okjaran vojaĝon kaj la sepkapan ensemblon "Kaj Tiel Plu", kiu ĉarmis ĉiujn. Ankaŭ vendiĝis libroj, kasedoj kaj kompaktdiskoj. Sekve de interfederacia kunveno, ni decidis pri principa komuna renkonto laŭ ritmo decidota, eble ĉiun duan jaron. La unua renkontejo povus esti Andoro.

Fine, ni ne forgesos gastronomion kaj abundan kaj nekostan tagmanĝon en tipa restoracio...ĉina!

J.H.

Franclingva libro de Ges. Robineau : ni decidis en oktobro donaci ĝin al la bibliotekoj, kie ni certas, ke oni volonte akceptos ĝin kaj disponigos al la publiko. Ne forgesu antaŭ la federacia kongreso de Quissac, la 9an de aprilo, indiki pri kiuj bibliotekoj ni povas kalkuli.

"Kaj Tiel Plu" : ne plu necesas prezenti tiun bonkvalitan kaj profesinivelan ensemblon, kiu ludis interalie en la UK de Montpellier. Ĝia repertuaro konsistas el katalunaj kaj internaciaj popolokantoj (en la kataluna, la okcitanaj kaj la esperanta lingvoj), inkluzive de trobadoraj, mezepokaj kaj famiĝintaj kantverkistaj kantoj. Ili venos al Tuluzo dum longa semajnfino de Februaro por registri KD kun Vinilkosmo (lasta parto de la Kolekto 2000). La E°-kulturcentro de Tuluzo provas organizi por ili turneon je tiu okazo. Pri la disdivido de la kostoj kaj aliaj praktikaj aferoj, kontaktu, se vi pretas peri aŭ organizi ion, Jeanne-Marie Cash, tel+fax 05 61 25 55 77.

C.B.E9, rue Georges Picot 34500 Béziers
Tél./Fax 0 467 311 318**CERCLE BITERROIS D'ESPERANTO**

Fédération Languedoc-Roussillon

ESPERANTO - STAĜO 2000 EN AGDE

Hérault - France

du 30 mai au 6 juin 2000

N'attendez pas la dernière minute pour envoyer votre adhésion!!!
Merci

Se mettre dans le bain...

C'est se mettre à nu, plonger le 1er orteil pour apprécier la température de l'eau puis enfin de plonger dans une eau agréable. Pour l'Espéranto la méthode ne diffère guère : vous avez fait vos 1er pas en suivant un cours de débutants et même un second, mais avez de la peine à franchir le seuil de la conversation...

Ne attendez pas la dernière minute pour envoyer votre adhésion!!!
Dankon

butants et même un second, mais avez de la peine à franchir le seuil de la conversation...


Cette année, monsieur GUZZI aura le plaisir de vous prendre par la main et de vous guider pour ce contact avec la langue parlée... Madame BERNARD fidèle au rendez-vous initiera les débutants. Nous saluons l'arrivée de monsieur SALADIN qui entre cette année dans le club des enseignants, il guidera le second degré, tandis que - comme de bien entendu - madame VINCENT sera présente au cours supérieur; celle-ci commentera le livre de J. FORGE « *Mia verda previero* » (n'oubliez pas de préciser sur le bulletin d'inscription si vous désirez l'acquérir)

EKZAMENOJ

Post profitdona staĝo ĉu eble vi ne ŝatus akiri diplomon? Tre facile vi povos ekzameniĝi je la fino de la studrestado. (ne tro timu, la ekzamenantoj ne manĝos vin sen trinki bonan regionan vinon) Nur necesas, ke vi avertu pri via intenco.

La vesperoj estas VIAJ,

Sed...sed, kial vi mem ne partoprenus al tiuj vesperoj... aŭdacu prezenti ion ajn...lumbildojn, filmojn, skeĉon aŭ iun ajn stultaĵon, certe ni multe ĝuos vian prezenton ĉefe ne timu...



Januaro 2000

STAĜO

Saluton !

Karaj geamikoj,
fine de la lasta staĝo ni kune antaŭvidis la datojn por la jaro 2000 : 30a de majo ĝis la 6a de junio. Nun tiuj datoj estas firme deciditaj kun la estro de Batipaume. Jam rezervu tiun semajnon por staĝi kun ni. Kiel ĉiujare vi bone ripozos, pli bone laboros kaj progresos.

- ĉi foje, ni starigos **4 kursojn** :
por komencantoj veraj aŭ apenaŭ por konversacio. (Sro Guzzi)
por progresantoj (Sro Saladin) : celo 2a ekzameno, sed la ekzameno ne estas deviga !
supera kurso (S-ino Vincent)

- Ni ŝatus akcepti multajn komencantojn. Do, eĉ se vi ne intencas staĝi, varbu ĉirkaŭ vi novulojn. Ili ne timu : ĉiuj staĝanoj estos feliĉaj faciligi la unuajn paŝojn. Certe, tiuj novuloj ne bedaŭros sian restadon.
- Kiel kutime, ekzamenoj okazos fine de la semajno. Konigu vian deziron kiel eble plej rapide (pere de aliĝilo se eble).
- Proponu vian helpon por plenigi la vesperojn : prelegeto, muziko, vidbendo, ktp estos bonvenaj. Ne necesas esti spertulo aŭ profesiulo; sufiĉas *iom da bonvolo*.
- Informu, reklamu en via klubo kaj regiono. Ju pli ni estos despli la staĝo estos interesa.
- Vi rajtas multobligi la informilon kaj aliĝilon.
- Rimarku, ke la estro de Batipaume iom malaltigis la prezon ! Raraĵo ĉu ne ? Ne atendu la lastan minuton sendi vian aliĝilon.
- Ni esperas vidi aŭ revidi vin. Ĝis baldaŭ .

Amike.

S. Authier

INFORMATIONS PRATIQUES :

Le stage se déroulera du **mardi 30 mai** (à partir de 15h) au **mardi 6 juin** après-midi, au centre de vacances de **Batipaume** - route de Rochelongue - 34300 **AGDE**.
Adhésion : 240 F (jusqu'au 30 Avril, 350 F ensuite). Gratuit pour moins de 25 ans et étrangers.
Pension complète : 1520 F par personne en chambre à deux lits, 1765 F en chambre individuelle.
Acompte de 500 F - adhésion incluse - (jusqu'au 30 Avril, 700F ensuite).
chèque ou mandat postal au nom de Fédération départementale d'espéranto de l'Hérault.
Bulletin d'adhésion auprès de "Sudfrancia Stejo" ou du Cercle Biterrois d'Espéranto.
Courrier ou demandes de renseignements auprès du CBE (adresse ci-dessus)

Article tiré de "La informilo", paru dans "Le Rotarien" de septembre 99 et rédigé par M. Eskil Svane, responsable en France de l'Amicale des Rotariens Espérantistes (Pézenas)

L'Espéranto - Langue sans frontières

Parmi les buts du *Rotary International* figure la compréhension internationale mutuelle. Mais comment est-il possible de faire avancer la compréhension internationale en l'absence de compréhension linguistique ?

Au Rotary, au moins en France, on dit souvent que nous sommes « les membres d'une élite, d'une certaine aristocratie parmi les hommes » - pour citer la lettre du district 1700, datée d'avril 1933-. Malheureusement, même les membres de cette élite ne peuvent pas se comprendre mutuellement - l'exemple parfait étant les réunions de Pézenas avec son club contact d'Oberstdorf : beaucoup de membres, de part et d'autre, ne peuvent communiquer sans intermédiaire ; quant à nos conventions internationales, elles ont besoin de l'interprétation simultanée en cinq ou six langues différentes. (...)

Les deux numéros spéciaux du *Rotarien*, intitulés « Voici le Rotary », résumaient la situation en une phrase courte et simple : « Les Rotariens espérantophones sont les seuls à pouvoir se comprendre sans l'aide d'interprètes ». L'amicale des Rotariens espérantophones comprend une soixantaine de membres d'une vingtaine de pays.

L'UNION EUROPEENNE

On trouve la même absence de communication directe dans les organisations internationales : avec 11 langues officielles l'Union Européenne dépense la bagatelle de 9 milliards chaque année pour ses services linguistiques, comprenant interprétations et traductions. C'est votre argent, notre argent, qui est ainsi gaspillé. Au *Pariement Européen*, les députés s'emportent souvent contre les mauvaises traductions des discours, surtout celles dites « à relais ». Le sens original du discours se trouve souvent déformé. Pour compliquer le tout, souvent la traduction n'est pas encore terminée que l'orateur suivant a déjà pris la parole. A propos : savez-vous pourquoi il n'y a pas de mots sur les futurs billets de la banque européenne ? On ne pouvait pas se mettre d'accord sur les langues à utiliser ! (...)

AIDES ET LITTÉRATURE

Le mouvement espérantiste tente aussi d'aider le Tiers-Monde mais naturellement dans une mesure beaucoup moins vaste que le Rotary. On compte parmi les exemples une école internationale pour orphelins au Brésil, des bassins pour pisciculture au Togo et une coopération entre espérantistes italiens et néerlandais lors de l'inondation du Pô.

Bien sûr, quand les espérantistes ne sont pas assez forts pour agir seuls, ils s'allient à d'autres mouvements. Par exemple les espérantistes de Colmar font partie de l'Association « Les enfants de Tchernobyl » et reçoivent des enfants chez eux. Des espérantistes de Saint-Nazaire sont membres du comité « Sarajevo- St

Nazaire » et la correspondance entre ces villes est faite en espéranto. Quant aux espérantistes de Toulouse et de Séville, ils ont reçu respectivement des enfants de Kiev et de Sarajevo.

Mais le mouvement pour l'espéranto est plus qu'un mouvement organisé. A côté de toutes ses activités, il a une production considérable de littérature tant traduite qu'originale, en prose et en poésie. Il a une presse aussi, qui paraît dans les cinq parties du monde - et même en braille et en éditions électroniques-. Et il faut souligner que toute cette production espérantophone est réalisée grosso modo par des bénévoles, sans la moindre aide extérieure, sans la moindre subvention et sans aucun soutien. Tandis que le gouvernement français par exemple, qui a subventionné les cours de graffiti qui défigurent nos murs, a refusé d'accorder le moindre sou à un mouvement vraiment culturel, reconnu comme tel par l'UNESCO et l'ONU. (En effet, l'UEA a obtenu des relations consultatives auprès de l'UNESCO en 1954, soit presque 40 ans avant le Rotary !).

L'espéranto c'est aussi la participation aux conférences, rencontres et festivals internationaux ; ce sont les émissions quotidiennes à la radio dans des pays aussi différents que la Pologne et la Chine ; ce sont une centaine d'universités, dont deux en France, qui enseignent la langue ; ce sont les bourses pour aider les jeunes Africains à participer aux congrès internationaux ; ce sont les échanges de jeunes qui ont appris la langue à l'école ; ce sont un bon nombre d'enfants qui ont l'espéranto comme langue maternelle, et dont les familles utilisent *Internet* pour se faire mutuellement part de leurs expériences. En une seule phrase, c'est l'éducation mondiale par la compréhension.

Malgré tous ces faits positifs, les préjugés contre l'espéranto restent profondément enracinés. Heureusement, cette situation est en train de se transformer, même en France, où des oeuvres ont été récemment publiées par les plus grands de l'édition : *Seuil*, *Robert Laffont*, *Ramsey*, *Que sais-je*, *l'Harmattan*. Parmi les gens qui défendent l'espéranto on trouve des linguistes renommés, comme le professeur André Martinet ou Claude Hagège, de la Sorbonne, ou des célébrités comme Umberto Eco, membre du Collège de France et auteur du *Nom de la Rose*.

E.S.



EVENTOJ MENCIIATAJ SUR LA FRONTPAĜA KALENDARO :

1) FEDERACIA KONGRESO : dimanĉon, la 9an de aprilo en ~~Ganges~~ ^{Ganges} ~~Quissac~~ (vidu p. 5 / pliaj detaloj SFS 152)

2) SAT-AMIKARA KONGRESO

en Fouquières-lez-Lens (62), de la 22a ĝis la 25a de aprilo .
Menciinde, ke la prezidanto de la organiza komitato estas samtempe la loka urbestro . Sabaton posttagmeze la ekskursantoj havos la okazon piede malkovri la nunan staton de ministaj kvartaloj (francingve : corons) kaj karbajn teramasojn (fr : terrils).
Mardon la 25an de aprilo oni vizitos apud Douai minan muzeon kaj poste rememoros la militajn kruelaĵojn sur lokoj Lorette, Vimy kaj oni vizitos la Pacan Centron. Kompreneble ankaŭ diversaj kunvenoj .
De la 1a de decembro estas uzata en Fouquières les Lens filatela stampo rilata al la kongreso kaj oni vendos unuataĝajn kovertojn kun tiu stampo. Kongresaliĝiloj estas haveblaj de SFS .



3) EUROPUNIA KONGRESO EN OOSTENDE (BELGIO) de la 27a de aprilo ĝis la unua de majo

Vi jam legis la kompletan programon en la lasta SFS. Ĉar ni ne konis tiam la prezojn en FF, ni indikis ilin en FB kaj en Eŭroj. Terure ! Iuj ankoraŭ ne kapablas konverti Eŭrojn en FF . Ili devos iom trejniĝi antaŭ la 1a de januaro 2002 !

Do, jen la tarifo de kotizoj en FF (pagotaj al UFE) -inkluzive de trajnveturado al Bruselo kaj ŝipveturado al Nieuwpoort, ktp :
-ĝis la 31a de januaro : 433 Francaj Frankoj (289 por junuloj malpli ol 30jaraĝaj)
-poste : 551 FF (368 FF). Pluraj federacioj jam aliĝis tiun kongreson. Iuj intencas partopreni unue la Sat-Amikaran kongreson, poste la Eŭropunian kongreson pro la kongrueco de la datoj kaj lokoj .

4) UNUA AKTIVULA SEMAJNFINO DE UFE en Boulouris / St Raphaël de la 1a ĝis 4a de junio

Ĝi anstataŭas la francan kongreson, kiun ni anoncis lastfoje en Loudéac komence de Aprilo. Ĝi disvolviĝos en agrabla ripozejo "Maison familiale... des houillères de Provence", 300 metrojn for de la marbordo kaj celas kunvenigi por aktivumi inter aktivaj francaj esperantistoj . La kongresejo estas facile atingebla per trajno (ĝis St Raphaël poste TER ĝis Boulouris). Dum la tritaga semajnfino okazos oficialaj kunvenoj kaj multaj komisionoj pri ĉiuj proponotaj temoj (informado, eksteraj rilatoj, TTT-paĝoj, revuoj, restrukturado de la asocio, prelegvojaĝo, trejnseminario pri verbado, ktp) .
Oni antaŭvidas intergeneracian laboreman etoson sub la suno de la sudo.
Aliĝo : 100 F Tranoktoj kaj 6 manĝoj : 785 F Nur la manĝoj : 480 F Krompago post la 1a de aprilo : 50F

5) STAĜO EN BATIPAUME (AGDE) de la 30a de majo ĝis la 6a de junio. Vidu detalojn p. 7

6) SOLIDARAJ TAGOJ EN ST CHAMOND de la 30a de junio ĝis la 5a de julio

St Chamond festos tiam, okaze de la jarmila ŝanĝiĝo, la homaran estontecon kaj provos kunigi solidarecajn kaj humanismajn asociojn kaj la lokan loĝantaron . Tiu-ĉi junulara renkontiĝo, kvankam festa kaj bonetosa, estos momento, kiam ni ĉiuj povos debati kaj interŝanĝi pri niaj agadoj en niaj respektivaj landoj, kaj mem kune kaj praktike sperti solidarecon tra konkretaj projektoj. La gastejo estos rando de nacia parko, kio garantias agrablajn ekskursojn kaj promenadojn, kaj ofertas ĉiujn eblecojn . Surloke ankaŭ naĝejo, sportejoj, ktp . La prezo dependas de la loĝkategorio (tendo, ĉambro), la manĝoj kaj la socia situacio, de 40 ĝis 120 Eŭroj. Detaloj kaj aliĝiloj estas haveblaj de SFS aŭ sur la reto <festos@esperanto.org>.

7) KAFE -KULTURA KAJ ARTA FESTIVALO DE ESPERANTO- en Tuluzo , 5a ĝis 9a de julio

Kiel la titolo indikas temos pri multfaceta festivalo . Ĉiutage estos diversaj programeroj kun diversaj E°-artaj grupoj ĉiustilaj el diversaj landoj kaj ĉiuvespere tri spektakloj . Estas ankaŭ projekto okazigi ĥorkantan staĝon kun e-lingva prezento de "Canto General" de Pablo Neruda, muziko de Theodorakis . Informoj ĉe kafe@esperanto.org
Aliĝilo troveblas en la novembro numero de "Franca Esperantisto" aŭ havebla de SFS. Aliĝkotizo ĝis la 31a de aprilo : 400F, ĝis la 1a de julio 450F kaj poste 500 F .
Tuj post Kafe estos laborbrigado por arkeologia esploro de kastela monteto en Pireneoj (10-17 VII)



85A UK DE ESPERANTO

TEL-AVIVO, ISRAELO
(25 JULIO-1 AŬGUSTO)

85-a Universala Kongreso de Esperanto
Tel-Avivo, Israelo
25 julio - 1 aŭgusto 2000

10



La nigra-blanka bildo maldekstre ne povas malfeliĉe reflekti la kolorojn de la mediteranea marbordo kaj de la sabla strando en Tel-Aviv (oficiale Tel-Aviv-Jafo), kie la samtempa hotelo kaj kongrescentro Dan Panora -ma kun siaj restoracioj, bufedoj, salonoj, naĝejo kaj san- kaj sport-centro, saŭno, ĵakuzio, ktp atendas la partoprenontojn de la 85a UK .

Tel-Avivo, fondita en 1909, estas la plej moderna urbo de Israelo, hejmo de komerco, kulturo kaj distro, urbo vigla tage kaj nokte, kiu pravigas sian devizon "la sen-paŭza urbo". Sed preter sia pulsanta ritmo kaj riĉa elekto de aktivadoj, Tel-Avivo estas feria metropolo, kun longaj, puraj, facile atingeblaj sablaj strandoj, marborda promenejo, jaht-haveneto kaj intensa gamo de marbordaj aktivadoj, kreitaj por kompletigi la ĝuon de la tepida maro, kiu ebligas naĝi, sunumi aŭ simple ripozi en la freŝa maraero dum la plejparto de la jaro . La nokta vivo viglas en sennombraj drinkejoj, tavernoj, kafejoj, restoracioj, noktkluboj kaj dancejoj, multaj el kiuj malfermitaj ĝis la frumateno. Tel-Avivo estas ankaŭ aĉetema paradizo, kie eblas trovi ĉiun varon importitan aŭ produktitan en Israelo. Ĉe Tel-Avivo troviĝas la antikva urbo Jafo, restaŭrita en 1953, kun siaj antikva haveno, pulbazaro, kaj granda vario de galerioj, memorajbutikoj, restoracioj kaj la artista kvartalo en la Malnova Urbo .

Kombinu kongresumadon kun turismado en unika, nov-malnova lando !

La dua aliĝ-periodo finiĝas la 31an de Marto : 939F membro de UEA, 1170 F ne-membro de UEA, 470 F por kunulo, jumulo, handikapulo -membro de UEA, 700 F same sed ne-membro de UEA. En la jaro de kongresaliĝo estas pli avantaĝe membriĝi al UEA .UFE proponas diversajn eblecojn :


- por la periodo 24 VII- 2 VIII, do nur por la kongreso ;
- por la UK kaj por la periodo 2-9 VIII, do por tuta semajno post la UK kun vizitoj de pluraj famaj lokoj kaj urboj de Israelo (Cezareo, Haifa, St Jean d'Acre, Jordano-valo, Tiberiada lago, Jeriko, Jerusalemo, Morta Maro...) .La kompleta programo haveblas de SFS aŭ de UFE .

En Aŭgusto ankaŭ kongresos la gejunuloj en Ĉinio .

En la revuo "Partir" n° 36 (dec99 - feb 2000) estas detala raporto pri Israelo ; pluraj paĝoj priskribas la kongresurbon Tel-Aviv .



HKJEA • TEJO • ĈJEA
 第五十六屆國際青年大會
 La 56^a Internacia Junulara Kongreso
 • HONKONGO •



56a Internacia Junulara Kongreso
 5a - 12a Aŭgusto, 2000
 Honkongo, Ĉinio

香港青年世界語協會
 Honkonga Junulara Esperanto-Asocio
 P.O.Box 92153, T.S.T. Post Office, Hong Kong.
 Homepage : <http://www.esperanto.org/hkjea>
 email : honkongo@esperanto.nu & hkjea@hotmail.com

Peticio :

La peticio por la elekteleco de esperanto je bakalaŭro daŭre progresas. Ni nur bedaŭru, ke ne ĉiuj E°-asocioj apogas tiun peton. Gratulojn al tiuj, kiuj subskribigis plurajn dekojn da personoj. Kompreneble necesus miloj da subskriboj por evoluigi la sintenon de la ministerio pri edukado, sed nenion entrepreni alportos neniun rezulton; la ĝisnunaj rezultoj instigas al daŭrigo de la kampanjo. Inter la subskriboj, ni citu tiujn de la municipo de Camps sur l'Agly (11). Deputitoj kaj senatanoj reagis favore, venis nur malmultaj nefavoraj respondoj. La konferenco de Seattle montris, ke neniŭ decido estas definitiva, se oni montras malkonsenton pri iu nejusta situacio.

Nova produkto de "Take" :


SFS jam informis vin pri la vendo de labor-gantoj kun la bone videbla vorto "esperanto" por reklami pri la lingvo. Nun ĝi proponas al vi "flagon malmultekostan kaj uzeblan ĉiaokaze, sen granda peno. Laŭ aspekto ĝi similas al firmaa flago flirtanta antaŭ entrepreno". La flago estas el blanka nilona ŝtofo kun ruĝaj kaj verdaj literoj. Oni povas pendigi plurajn flagojn sur ŝnuro kaj tiel kapti ĉiun ŝancon esti rimarkata. La okazoj estas diversaj: budo je forumo de asocioj, plenaera festo, kongreso, renkonto.

Por sendo al Francio, sendkostoj entenataj: 1 ekz 44,20F; 2 ekz 88F; 3 ekz 139,50 F; 4 ekz 179,50F, 5 ekz ankaŭ 179,50F (alivorte ĉiu kvina ekzemplero estas senpaga)

Mendu ĉe Take-Sro André Grossmann-5, rue des Pyrénées-68390 Baldersheim CCP Take Strasbourg 25 49 46 A

Pri la laborgantoj: 1 paro blanka-verda: 20F (sendkostoj: 1 paro: 8F, 2 aŭ 3 paroj: 16 F, 4 ĝis 7 paroj: 24,50F)

1 paro kolora: 15F (sendkostoj: 1 aŭ 2 paroj: 16F; 3 aŭ 4 paroj: 16F; 5 ĝis 8 paroj: 24,50F)

**Kuiradaj semajnfinoj de JEFO :**

Post la sukcesaj oliva semajnfino (en Maury : 66) kaj vinbera semajnfino en Edenkoben (Germanio), la asocio de la "junulara esperantista franca organizo" (Jefo) proponas al siaj membroj :

-Kreolan semajnfino en Plouëzec (Bretonio) de la 24a ĝis 26a de marto. *Eĉ se la semajnfino ne okazos sur la Insulo Réunion, vi povos provi la plej ordinarajn kaj bazajn receptojn kaj aŭdi iom rilatajn muzikojn;*

-Tao-semajnfino (7-9 IV) en Guillaumes (norde de Nico). *La celo estos reamikiĝi kun la eternaj leĝoj de la naturo, frandante naturajn nutraĵojn vegetalajn, repektante la nemikseblecon inter ili, lernante la efikon sur nia sano ;*

-Poman semajnfino en Normandio apud Caen en oktobro (27-29 X)

-ankaŭ partoprenon en la "solidaraj tagoj de St Chamond" (30 VI-5 VII) kaj KAFE en Tuluzo (5-9 VII).

Pri tiuj eventoj kaj tarifoj, adresoj de Jefo, kontaktu SFS aŭ la delegiton Coralie Delnatte 04 67 10 05 96

TTT-paĝoj (tut-tera teksaĵo) :

Pri Jefo konsultu : www.esperanto.org/jefo

Pri revuoj : "Afrikanio" -"via unua reta revuo afrika" : <http://www.africnature.com/tete1.htm>

"Perua Esperanto-bulteno" : <http://www.geocities.com/amikoj/>

Pri navig-helpo : <http://www.jec.net/retkompaso/>

Pri tradukado :de esperanto al la angla : <http://webalias.com/eoxx/>

Pri Kotopo en Liono : <http://ttt.esperanto.org/internacia/kotopo/>

Pri Kafe en Tuluzo : <http://perso.wanadoo.fr/kultur.art.festival.eo/>

Kaj nun ? Et maintenant ?

Dans le dernier numéro de SFS, allusion était faite aux prochaines discussions de Seattle. M. Allègre, le ministre bien connu, rappelait alors ("Le Monde" du 24/11) son opposition à ce que l'éducation fasse partie des champs de négociation discutés par l'OMC, tout en avançant un distinguo entre les études des jeunes aux Etats-Unis ou en Grande Bretagne ("absolument souhaitable") et celles faites dans des universités américaines implantées en Europe ("l'enseignement uniformisé conduirait à un monde uniforme : one teaching, one thinking"). Il y a ainsi des subtilités... Dans le projet de finances pour 2000, commission des affaires étrangères, avis 1863, tome IV, M. Allègre est cité dans les conclusions, ayant parlé de "cette extraordinaire machine d'invasion intellectuelle que constituent désormais les Etats-Unis"... Prise de conscience récente ?

Si trois langues sont officielles à l'OMC, M. Pascal Lamy, "commissaire européen et Français de surcroît, a cru bon d'intervenir à Seattle en anglais, tandis qu'aucune version française de son allocution n'était disponible" et le même article du "Monde" précise : "A Genève, siège de l'organisation et ville francophone, les retards d'une semaine, voire de mois, sont courants dans la livraison des versions en français des documents de travail..." M. Luc Besson expliquait pourquoi il avait tourné sa "Jeanne d'Arc" en anglais (doublage ensuite en français) : "c'est la langue de plus de la moitié de la planète" (sic). "L'Express" annonçait en gros titres : "tous bilingues, you too", précisait même qu'il fallait être "bilingue dans la langue de Shakespeare pour surfer sur Internet" (sic). Hors de l'anglais, point de salut...

M. Domenach, dans "La Croix" du 8/12, titrait : "trois langues étrangères obligatoires". Selon lui, chaque étudiant devrait "maîtriser" (sic) au niveau de l'université : "l'anglais, la langue de tout le monde, une langue européenne et une grande langue mondiale. Pas moins". Après la rencontre d'Helsinki, nous avons appris que la communauté européenne, riche actuellement de 15 membres, pourrait en compter 28 dès 2003. Pratiquement le double ! Alors, il ne faut pas s'étonner si les solutions miracles vont fleurir de plus en plus concernant les moyens de communication.

La réalité, elle, n'a guère évolué entre temps. Un article bien documenté, paru dans "Le Monde" du 30 novembre, détaillait "le coût du multilinguisme" dans les instances de l'union européenne. Coût direct (dépenses de traduction et d'interprétation uniquement) : 12 milliards de francs par an. Dans le coût indirect, il faudrait compter les cabines d'interprétation, le matériel, les cours de langue, les publications officielles en onze langues, les programmes de soutien à l'apprentissage des langues étrangères, etc. Et l'auteur de l'article de conclure : "Les difficultés actuelles pour respecter le multilinguisme seront décuplées demain avec les futurs élargissements".

Le dernier SFS mentionnait aussi les expériences de traduction automatique. Si cette dernière était satisfaisante, on pourrait s'inquiéter sur le désir et le besoin de nouvelles recrues d'apprendre l'espéranto. Il en serait en fait de même pour les autres langues. Plusieurs revues spécialisées en informatique se sont penchées dernièrement sur la question et la conclusion est commune : nous sommes encore loin d'atteindre un résultat convaincant. La traduction dite automatique se réduit actuellement à un premier dégrossissage qu'il faut interpréter avant une mise en forme définitive. Non sans humour, "Wanadoo", le service d'accès à Internet, indique que, "pour en finir avec les contresens et les barbarismes", les logiciels vous permettent des "traductions encore aléatoires". "Courrier International" du 14 octobre cite "L'Hebdo" de Genève et le résultat avec les deux logiciels de traduction automatique les plus connus sur le marché. Parmi trois extraits, d'un texte politique, d'un texte littéraire et d'un texte scientifique, nous avons choisi le dernier car les risques de confusion sont plus limités : Texte de la NASA : On March 5th, 1998 Prospector captured the public imagination by announcing the discovery of a definitive signal for water ice at both of the lunar poles.

Version "reverse pro" : Le 5 mars le Prospecteur de 1998 a capturé l'imagination publique en annonçant la découverte d'un signal définitif pour le sorbet à tous les deux des poteaux (pôles) lunaires.

Version "systran" : Le 5 mars, 1998 le prospecteur a capturé l'imagination publique en annonçant la découverte d'un signal définitif pour la glace de l'eau à tous les deux poteaux lunaires.

Version "humain" : Le 5 mars 1998, Prospector a fait sensation en révélant que des éléments signalant de manière certaine la présence de glace sur les deux pôles de la Lune avaient été découverts.

Les traductions des deux autres extraits peuvent être classées dans la catégorie "comique".

Il nous reste encore bien du chemin à parcourir avant d'aboutir à une communication satisfaisante entre les six milliards de terriens !

J.H.

P.S. : dernière minute. Ne quittons pas la période des vœux sans citer le courrier reçu par notre jeune ami Mikaelo de Quissac, en réponse au message adressé au Président de la République sur le site Internet de l'Elysée : "Sensible à la confiance que vous lui témoignez en lui faisant part de votre intérêt pour la communication entre les peuples, Monsieur Jacques Chirac m'a chargée de vous en remercier.

Je puis vous assurer que le Chef de l'Etat demeure particulièrement attentif aux aspirations de jeunes qui, comme vous, souhaitent construire ainsi un monde fraternel et solidaire."

Le Chef de Cabinet : Annie Lhéritier

LINGVA ANGULO

Kiel elturniĝi por esprimi la francan "au fur et à mesure" ?

Jen tri manieroj el bonaj aŭtoroj :

1) El "Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud / Ribillard, p. 45+9 :

"Li formangiĝis la fritpastaĵojn vice laŭ kiel li eltiris ilin el la bolanta oleo".

2) El "Vagado sub palmoj" (Ribillard p.11+17) :

"Matene (en dezerto) netaj kaj bluaj estas la ombroj, sed grade laŭ la supreniro de la suno, ili malaperas kaj la konturoj de la dunoj stompigaĝas".

3) El "Paŝoj al plena posedo" de Rosetti, p.132-5 :

"... Samrite kun la kresko de la besto (leonido), kreskis la premzorgo de Benzo (la posedanto)".

LASTE APERIS (libroservo de UEA, prezoj en Eŭroj, triona rabato ekde 3 ekz. de sama titolo)

Respondoj pri rasismo :

"Paĉjo, kio estas rasismo?" Tahar Ben Jelloun

(gajninto de la premio Goncourt en 1987)

Tradukis Armela Le Quint kaj Ĵak Le Puil.

52 paĝoj ; 6,50 C

"Per ĉi tiu libro mi provas respondi la demandojn de mia filino. Ĝi celas la infanojn, kiuj ankoraŭ ne havas antaŭjuĝojn kaj volas kompreni. Ĝi helpas (la plenkreskulojn) respondi la demandojn, pli embarasajn ol ni kredas, de siaj propraj infanoj".

Legolibro el Kanado :

"Lito apud la fenestro" de Betty Salt

111 p. 4,80 C

Simplaj rakontoj, teatraĵetoj, poemoj en facila lingvaĵo kaj per mallongaj tekstoj. Taŭgas kiel progresiga legaĵo



Por facile trovi alian vorton :

Esperantaj sinonimoj" de Jaan Ojalo

96 p. 7,20 C

Por vigligi kaj variigi sian stilon. Bazita sur Plena Ilustrita Vortaro, ĝi enhavas 1925 kapvortojn kaj 5500-vortan indekson. Taŭgas por pliriĉigi sian vortostokon.



Vortaro de hejma esperanto :

"Hejma vortaro" de Jouko Lindstedt

63p. 7,50 C

Vortoj por diversaj ĉiutagaj aferoj. La esperantaj kapvortoj estas ankaŭ tradukitaj en 13 lingvoj : angla, finna, franca, germana, hebrea, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, portugala, rusa kaj sveda, do tiu vortaro ankaŭ utilos por viaj vojaĝoj aŭ kontaktoj kun eksterlandanoj.

Kio estu nia lingvopolitiko ?

"Por aktiva lingvo-politiko"

71p. 7,10 C

Aktoj de la lingvopolitika seminario dum la UK de Prago. Ĉu nur UEA devas havi lingvopolitikon aŭ la tuta E°-komunumo? Kiel lerni el la spertoj de naciaj lingvoj?



NOVA TELEVID-SERIA KURSO



VERKITA DE **POR INSTRUI ESPERANTON**
PAUL GUBBINS
KUN JUNAJ TALENTAJ
ESPERANTISTOJ EN LA ROLOJ

Esperanto – pasporto al la tuta mondo konsistas el 15 lecionoj (po 30 minutoj) kaj akompana presita materialo, celantaj individuon aŭ grupan studadon. La distra historio, konstruita sur didaktika bazo, faciligas kaj ĝojigas la lernadon. Ĉiu leciono okazas plene en Esperanto kaj enhavas tri partojn: enkondukon, intrigon kaj resumon.

La kontinueco de la aventuroj de familio Bonvolo, la televidseria karaktero, kaj la vigla kaj sprita dialogo tenas la atenton de lernantoj – kaj eĉ de pli spertaj parolantoj de nia lingvo!

La resumo detale traktas la ĉefajn gramatikajn erojn prezentitajn en ĉiu ĉapitro. Skribekzercoj, verkitaj de Stefan MacGill, kompletigas la lecionojn.

La unuaj ok lecionoj jam aperis kaj estas vaste laŭdataj. Prezo de unu kompleto de kvar lecionoj (1-4 aŭ 5-8): € 76,50 plus imposto 6% (nur por la landoj de Eŭropa Unio) kaj sendokostoj 10%. Mendo en PAL ĉe la Libroservo de UEA. NTSC estas mendebla ĉe ELNA.

Ĝuu kaj ĝuigu Esperanton kun la familio Bonvolo!

DISTRA PAĜO

KRUCVORTOJ

Horizontale

- I) Azia epopea libr(o).
- II) Do ne parolu pri tia !
- III) Plantama svedo / Oceania mamul(o).
- IV) Eta eta part(o) / s : Helena vento.
- V) Fiersimbol(o) / Elarba baraf(o).
- VI) Primontar(a).
- VII) Ludkolor(o) / Kun koloro.
- VIII) Trinkplant(o) / Despli nenio.
- IX) Celpart(o).
- X) s : Helico / Sekurnest(o).

s : sone

Vertikale

- 1) Mara gigant(o).
- 2) Por ti(u) ĉi, for la studojn ?
- 3) Misĝuigul(o) / s : Filo de Heleno.
- 4) Aprobo / Bela ŝtono.
- 5) Plendo / Pasi(o) / s : Saketo.
- 6) s : Membro / s : Por ricevi sian gazeton de la lasta ĝis la unua / Virnom(o).
- 7) Parolregistri(oj).
- 8) Frukristana doktrin(o).
- 9) Virinomo / Virnom(o).
- 10) Kontraŭ multaj malbonoj.

BOPARO.

MINURO

14

I										
II										
III										
IV										
V										
VI										
VII										
VIII										
IX										
X										
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

Solve de n° 150

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	S	U	P	E	R	L	A	T	I	V
II	U	R	I	N	O		M	A	L	E
III	B	E	K		M	K		N	I	S
IV	S	T	R	O	B	O	S	K	O	P
V	T	R	A	M	O	N	T	A	N	E
VI	A		T		E	T		O		R
VII	N	I		O	D	E	R	O		T
VIII	T	A	B	E	R	N	A	K	L	I
IX	I	L	U	R		E	K	R	A	N
X	V		B	O	F	R	O	N	T	O

ESPERANTA HARARSTILO?

Afrika esperantisto, kiu fuĝis al Sudafriko el rifuĝejo en Tanzanio pro la malbonaj kondiĉoj kaj ĉar li ne povis studi, labori kaj progresi mens, establis malgrandan moveblan frizejon apud vojo kaj tie reklamas sian "Esperanto Hair Cut" (esperanta frizejo) per fotoj kaj desegnoj.

Esperanto Hair Cut



Certe la preterirantoj demandas, kio estas Esperanto kaj kia estas Esperanta hararstilo! Laŭfote la Esperanto-hararstilo ne estas stranga, sed tute akceptebla vira modo.

MODIFITAJ LITEROJ

Fakte estas ĉiufoje pluraj solvoj. Jen kelkaj el ili :

bero, belo, felo, falo bero, fero, fano, falo bero, beno, ĉeno, ĉino bero, fero, feno, ĉeno, ĉino
 bero, baro, (bato), bano, sano karto, korto, korko, porko, pordo/ karto, korto, kordo, pordo
 karto, parto, pasto, masto, fasto, festo pomo, poŝo, paŝo, pano, sano pomo, pota, peto, pelo, relo

STRANGA PARENĈARO

Mi edzinigis al vidvino, kiu havis plenkreskan filinon. Mia patro ofte vizitis nin, li enamiĝis al mia vicfilino kaj edzinigis ŝin al si. Tiel mia filino iĝis mia patrino.

Mia edzino naskis knabeton, kiu do estas nia onklo, ĉar li estas frato de mia patrino kaj bofrato de mia patro. Ankaŭ al mia filino naskiĝis knabeto, kiu estas mia frato kaj samtempe mia nepo.

Mia edzino estas samtempe ankaŭ mia avino, ĉar ŝi estas la patrino de mia patrino. Do mi estas la edzo de mia avino, kaj se mi estas la edzo de mia avino, mi estas la avo de mi mem. Kiel stranga parenĉaro!

ROUTIER DOUBLÉ OU SOUS-TITRÉ ?

Un transporteur routier français explique à « Libération » (29/10) le casse-tête de la concurrence allemande sur les routes françaises : « Comment voulez-vous qu'une autorité quelconque vérifie un tracteur allemand traînant une remorque italienne, avec du fret espagnol, entre Paris et Amiens, avec un chauffeur qui parle une langue slave ou l'allemand et présente des papiers en alphabet cyrillique ? »

Réponse : en lui collant une contredanse en espéranto !

(«Le Canard Enchaîné» 3-11-99)

Limdato por la venonta SFS, kiu aperos fine de marto, antaŭ la federacia kongreso en Quissac (9a de aprilo) estas sabato la 18a de marto. Sendu viajn kontribuojn al SFS ĉe Jean Hénin -Beauregard- Route de Montcayroux 48500 La Canourgue Tel/Fax : 04 66 32 86 36 Jean.Henin@wanadoo.fr Anticipan dankon !